*Lian domon pasante, per unu okulo*
*Mi ekvidis panteron kun guf' por kunulo.*
*La pantero englutis ja ĉion gluteblan,*
*Al la gufo lasante nenion manĝeblan.*
*La festeno finiĝis : al la guf' li permesis*
*La kuleron empoŝi ; li mem ne forgesis*
*La tranĉilon enpaki virinan en mufon*
*Kaj per tio li ankaŭ distranĉis la —— !*

En tiu momento la Falsa Kelonio malpacience interrompis ŝin :—

"Por kio utilas" li diris "ke vi eldiru tiajn versaĉojn, ne dume klarigante ilin ? Ĝi estas ja la plej konfuziga lingvaĵo kiun iam en la vivo mi aŭskultis."

"Jes" konsente diris la Grifo "ankaŭ mi opinias ke estos bone ne plu daŭrigi tiun deklamaĵon." Ankaŭ Alicio tre ĝoje konsentis.

"Ĉu vi volas ke ni tradancu la duan parton de la Omara Danco ?" proponis la Grifo "aŭ ĉu vi eble preferus ke la Falsa Kelonio kantu al vi ?"

"Ho, mi certe preferus la kanton, se la Falsa Kelonio komplezos." Alicio respondis tiel fervore ke la Grifo diris, ofendite :

"H'm ! Pri gustoj ne utilas diskuti." "Do, se agrable al vi, karulo, vi kantu por ŝi '*Kelonia Supo.*'"

La Falsa Kelonio ekĝemis profunde, kaj kantis per voĉo iafoje plorsufokita :



*Supo alloga de verda kolor'*
*Preta je la sepa hor' !*
*De la vespero la ĉefa glor' !*
*Supo vespera, bela vi Sup' !*
*Supo vespera, bela vi Sup' !*
*Su-upo ve-espera, Su-upo ve-espera*
*Bela, ho bela vi Sup' !*

*Ho, bela Supo ! pli bona ol truf',*
*Ol supo el bovida huf' !*
*Ĉion fordonus mi por suf—*
*—iĉe da vi, ho bela vi Sup' !*
*—iĉe da vi, ho, bela vi Sup' !*
*Su-upo ve-espera, Su-upo ve-espera !*
*Bela, ho bela vi Sup' !*
*—VI SUP' !*

"Denove la horon" ekkriis la Grifo. Sed kiam la Falsa Kelonio nur komencis rekanti ĝin, de iu malproksima loko aŭdiĝis laŭta ekkrio :—

"*La proceso komenciĝas !*"

"Vi rapidu do" kriis la Grifo al Alicio, kaj preninte ŝin per la mano, ĝi rapidis for, ne atendante la finon de la ĥoro.

Pri—kio—oni—pro—cesas ?" Alicio dum la kurado demandis spiregante ; sed la Grifo nur kuris pli rapide. Dume sekvis ilin—pli kaj pli mallaŭte—la voĉo de la Falsa Kelonio finanta per tre melankoliaj tonoj la rekantaĵon :

*Su-upo ve-espera ! Supo ve-espera !*
*Bela, ho bela vi Sup' !*